# A.E.A.-informilo

**Numero 5** **Aprilo 2009**


# PorEsperanta propagando

La 5an de julio de la pasinta jaro kelkaj membroj el la estraro de **Astura Esperanto Asocio** renkontiĝis kun kelkaj eksterlandaj geesperantistoj en Pruvjo, ĉe la bieno de la kuracisto Valentín Pérez. Ĉi tiu estas esperantisto aliĝinta al la t.n. **Pasporta Servo**, t.e. gastiga servo pere de Esperanto. Pasporta Servo estas adresaro de homoj el la tuta mondo, kiuj senpage akceptas gastojn en siaj hejmoj. La gastigantoj indikas la kondiĉojn, ekzemple pri nefumado, aŭ la nombro da gastoj aŭ tranoktoj, kaj povas mencii diversajn komentojn pri siaj interesoj, deziroj, atingebleco kaj simile. Gastigantoj ĝuas akcepti homojn de diversaj landoj, gastoj ĝuas senpagan restadon, kaj ili facile interkomunikas per **Pasporta Servo**. Ofte, gastigantoj helpas al gastoj pri transportado, ekkoni la lokon ktp.

Ĉi-kaze, la gastoj de nia samideano Valentín estis aro da geesperantistoj el diversaj landoj de la Eŭropa Unio: Germanio, Britio, Polujo kaj precipe Francio. Ili alveturis ĉi tien per aŭtobuso kiun ili luprenis ĝuste por tiu vojaĝo. Post trairi kelkajn landojn de Okcidenta Eŭropo ili venis ankaŭ al Hispanio. Ilia destino estis Kompostelo, sed laŭ klarigis al ni la organizintino kaj gvidantino de tiu ekspedicio, profesorino Michèle Abada-Simon, ilia vojaĝo estas nek pilgrimado nek turismo sed propaganda manifestacio favore al Esperanto. La tagon antaŭ ilia alveno al Asturio ili estis en Bilbao surstrate disdonante propagandon pri la Internacia Lingvo. Tion ili faras en ĉiu loko kien ili alvenas; tiumatene ili estis plenuminte tiun aktivadon en Oviedo. Ili planas organizi tiutipajn vojaĝojn por venontaj jaroj kaj invitas la hispanajn geesperantistojn partopreni en ili. La francaj kaj germanaj membroj de tiu ekspedicio informis pri alia iniciato kiun ili prenis por propagandi por Esperanto en siaj landoj. Okaze de la balotado por la Parlamento de Eŭropa Unio ili prezentas esperantistan kandidataron, kiu rajtigas ilin efektivigi ian oficialan propagandon. Pri tiu temo vidu pli ampleksan informon en la numero 83a de la revuo HELECO.





**FOTO-RAPORTO DE LA RENKONTIĜO**


